

125 años de cultura en esperanto

Este año 2012 se conmemora el 125 aniversario del esperanto, idioma iniciado en 1887 por L. L. Zamenhof. A lo largo de todos estos años ha desarrollado una interesante cultura propia, de carácter internacional, que se manifiesta sobre todo a través de su literatura.

La presente exposición se centra en la producción bibliográfica en esperanto en nuestro país y se articula en torno a cuatro ejes.

En el primero ofrecemos una muestra de las primeras publicaciones en España. Uno de los autores más prolíficos de los primeros años, cuya influencia se extiende durante más de dos décadas hasta el comienzo de la Guerra Civil, fue el militar republicano Julio Mangada Rosenörn, algunas de cuyas obras pueden verse aquí. En estos primeros años, tuvo una gran repercusión la celebración en Barcelona en 1909 del 5º Congreso Mundial de Esperanto, durante el que L.L. Zamenhof fue condecorado por Alfonso XIII con la Orden de Isabel la Católica.

El segundo gira en torno a la figura de Juan Régulo Pérez, promotor y editor de obras en esperanto desde 1952. Durante cerca de veinticinco años publicó en la colección *Stafeto*, obras maestras de la literatura en esperanto, siendo reconocido en el ámbito internacional como el principal artífice de la difusión de la cultura. Otras colecciones importantes, herederas del buen hacer de Régulo, son *Hispana Literaturo*, promovida por la Federación Española de Esperanto, y *Sferoj*, de ciencia ficción, editada por el Grupo Nifo.

El tercer eje muestra la obra de los principales autores españoles contemporáneos. Desde 1993, a raíz de la publicación del poemario colectivo *Ibere libere*, de Gonçalo Neves, Liven Dek, Miguel Fernández y Jorge Camacho, se empieza a hablar internacionalmente de la Escuela ibérica. Otros autores que forman parte de este grupo literario son Abel Montagut, Joxemari Sarasua y Antonio Valén, aunque sin duda la figura que mayor influencia ha tenido en el desarrollo del grupo es Fernando de Diego.

Por último se presenta una miscelánea de obras que por diversos motivos pueden ser consideradas de interés, como por ejemplo, las siguientes: *Gran diccionario español-esperanto*, de Fernando de Diego; *Concise encyclopedia of the original literature of Esperanto, 1887-2007*, de G. Sutton; *Don Quijote habla esperanto*, que recoge las ponencias del 64º Congreso Español de Esperanto, (Alcalá de Henares, 2005) dedicado al cuarto centenario de la primera edición del Quijote; o la biografía de Zamenhof, *El hombre que desafió a Babel (L'homme, qui a défié Babel)*, de Centassi y Masson.

125 jaroj da esperanta kulturo

En la jaro 2012 oni jubileas la 125-jariĝon de Esperanto, lingvo iniciatita en 1887 de L.L. Zamenhof. Laŭlonge de tioma tempo ĝi disvolvis interesan propran kulturon, kun internacia karaktero, kiu montriĝas ĉefe per ĝia literaturo.

La nuna ekspozicio enfokusiĝas sur la esperantaj eldonitaĵoj aperintaj nialande kaj ĝi konsistas el kvar aksoj.

Unue ni prezentas specimenojn el la unuaj publikigaĵoj en Hispanio. Unu el la plej fekundaj aŭtoroj dum la fruaj jaroj, kiu ĉefrolis dum pli ol du jardekoj ĝis la eko de la Enlanda Milito, estis la militisto Julio Mangada Rosenörn, kelkajn el kies verkoj oni povas vidi ĉi tie. En tiuj fruaj tempoj elstaran gravecon havis la okazigo en Barcelona en 1909 de la 5a Universala Kongreso de Esperanto, dum kiu L.L. Zamenhof ricevis el la reĝo Alfonso la 13a la Ordenon de Isabel la Católica.

La dua traktas pri la figuro de Juan Régulo Pérez, stimulantulo kaj eldonanto de esperantaj verkoj ekde 1952. Dum preskaŭ dudek kvin jaroj li publikigis en la kolekto *Stafeto* ĉefverkojn de la esperanta literaturo, tiel ricevante internacian agnoskon kiel eminenta diskoniganto de kulturo. Aliaj gravaj kolektoj, heredintoj de la bona laboro de Régulo, estas *Hispana Literaturo*, disvolvata de Hispana Esperanto-Federacio, kaj *Sferoj*, pri scienc-fikcio, eldonita de Grupo Nifo.

La tria akso montras la verkaron de la ĉefaj hispanaj nuntempaj aŭtoroj. Ekde 1993, okaze de la eldono de la plur-aŭtora poemaro *Ibere libere*, de Gonçalo Neves, Liven Dek, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho, oni komencas internacie paroli pri la Ibera Skolo. Aliaj aŭtoroj kiuj konsistigas ĉi verkistan grupon estas Abel Montagut, Joxemari Sarasua kaj Antonio Valén, sed sendube la figuro kiu plej influis la disvolvon de la grupo estas Fernando de Diego.

Laste oni montras miksaĵon de verkoj, kiujn diverskiale oni povas konsideri gravaj, kiel ekzemple: *Gran diccionario español-esperanto*, de Fernando de Diego; *Concise encyclopedia of the original literature of Esperanto, 1887-2007*, de G. Sutton; *Donkiĥoto parolas Esperanton*, kompilo de la prelegoj okazintaj dum la 64a Hispana Kongreso de Esperanto, (Alcalá de Henares, 2005) dediĉita al la kvarcent-jariĝo de la unua eldono de Donkiĥoto; aŭ la biografio de Zamenhof, *La homo kiu defiis Babelon (L'homme, qui a défié Babel)*, de Centassi kaj Masson.